

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

35 JAROJN K.E.I.

•
PLEJ GRAVA TASKO

•
XVII NACIA REVUO
DE
E-KANTOJ KAJ
PAROLO

•
REMEMOROJ PRI
DICO
PETROV

•
MEMORE AL ADA

•
NI RECENZAS

•
ENLANDA MOVADO

•
SENMORTA
SEK SPIRO





KOMUNAJO DE EGALRAJTAJ PARTNEROJ

(35 jarojn Konsilio de Ekonomia Interhelpo)

En niaj tagoj la komunaĵo de socialismaj landoj karakteriziĝas per ĉiam pli intimaj interrilatoj, per ĉiam pli granda nombro da komunaj elementoj en ilia politiko, ekonomio kaj socia vivo. Unuaranga elmontriĝo de tiu historia proceso de ĉiufanka unuigo estas la socialisma ekonomia integreco.

La ĉefa celo de la Konsilio de Ekonomia Interhelpo (KEI) estas la unuigo kaj la kunordigo de la penoj de la ŝtatoj-membroj de KEI, kiu kontribuos por pli celkonforme planita disvolviĝo de iliaj naciaj ekonomioj, por stimulado de la ekonomia kaj teknika progreso, por senĉesa plialtigo de la laborproduktiveco kaj la bonstato de la popoloj en tiuj landoj.

La internacia ekonomia organizo de la socialismaj landoj — KEI, estis kreita en 1949. En ĝi membras Bulgario, Pollando, Rumanio, Sovet-Unio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Germana Demokratia Respubliko, Mongolio, Kubo kaj Vjetnamio. Kiel observantoj de ĝia aktivado en ĝi partoprenas ankaŭ la Korea Popol-Demokratia Respubliko (KPDR), Laoso, Angolo, Etiopio kaj Jugoslavio.

La ekonomia kaj scienc-teknika kunlaborado en KEI efektiviĝas surbaze de la akceptitaj en ĝia Statuto principoj de plena egalrajteco, konsidero de la suvereneco kaj la naciaj intereso, reciproka profito kaj kamaradeca interhelpo. La rekomendoj kaj la decidoj de KEI estas akceptataj konforme al interkonsento de la interesiĝintaj ŝtatoj-membroj kaj ili ne estas validaj por la landoj, esprimintaj sian malinteresecon rilate konkretan problemon.

La bazaj formoj de ekonomia kaj scienc-teknika kunlaborado estas: eksterkomercaj kaj kreditaj interrilatoj, teknika helpo, kunlaborado en scienc-teknika aktivado, konstruado kaj ekspluatado de apartaj objektoj, kunordigo de soci-ekonomiaj planoj, specialigo kaj kooperigo de la produktado.

La kunordigo de la naciaj planoj por soci-ekonomia evoluo estas ĉefa principo en la aktivado de KEI kaj ĝi estas aprokata por ĉiam pli longaj periodoj. Konkreta pruvo pri tiuj tendencoj estas la transiro de apartaj integraj aranĝoj al kompleksa, multjara programo pri kunlaborado. Tio ja evidentiĝis

ebla pro amasigo de sperto en la ekonomia interaktivado: en 1971 estis aprobita Kompleksa programo por plua profundigo kaj perfektigo de la kunlaborado kaj por evoluo de la ekonomia integreco de ŝtatoj-membroj de KEI.

La Kompleksa Programo difinas la celojn, la ĉefajn direktojn kaj la formojn de planita evoluo de la ekonomia kaj scienc-teknika kunlaborado inter la ŝtatoj de la socialisma komunaĵo. Ĝi ampleksas periodon de 15—20 jaroj kaj difinas la taskojn pri kunlaborado en la bazaj branĉoj de la nacia ekonomio. Tiu ĉi grava dokumento estas prilaborita fare de ĉiuj ŝtatoj-membroj de KEI kaj ĝi celas altigon de la kunlaborado inter la socialismaj landoj al konsiderinde pli alta etapo. La programo antaŭvidas, ekzemple, komunan prilaboron kaj ekspluatadon de naturaj riĉaĵoj, komunan konstruadon de grandaj industriaj kompleksoj por kontentigo de la bezonoj de ĉiuj partneroj, longperiodan planadon de la kooperigo inter entreprenoj kaj inter kompletaj industriaj branĉoj en la socialismaj landoj.

Pri la atingitaj sukcesoj fare de la socialismaj landoj-membroj de KEI post la aprobo de la Programo atestas tia grava faktoro kiel la amplekso de la nacia enspezo. Dum la unuaj 10 jaroj de ĝia realigo la nacia enspezo altiĝis jene: en Bulgario — per 96 procentoj; en GDR — per 59%; en Mongolio — per 81%; en Pollando — per 83%; en Rumanio — 2,4oble; en USSR — per 62%; en Hungario — per 62%; en Ĉeĥoslovakio — per 57%.

La senĉesa kresko de la ekonomia kaj scienc-teknika potencialo de la ŝtatoj-membroj de KEI, la demokratiismo de iliaj interrilatoj, en kiuj efektive realiĝas vera egalrajteco inter la partneroj, levis sur novan, ankoraŭ pli altan nivelon la aŭtoritaton de la socialisma komunaĵo. La kunlaborado inter la ŝtatoj-membroj de KEI ĉiam pli profunde influas sur la mondajn ekonomiajn interrilatojn, kontribuas por forigo de la diskriminacio, malegaleco kaj unuflanka profito en la interrilatoj. Tio ja estas la kaŭzo por seninterrompa kresko de la interesiĝo pri kunlaborado kun KEI kaj kun apartaj ŝtatoj-membroj de la socialisma komunaĵo.

RADI BANĈEVSKI



PLEJ GRAVA TASKO

(El la enkonduka parolado de TODOR JIVKOV —
ĝenerala sekretario de CK de BKP, antaŭ la nacia
konferenco [de BKP pri la problemoj de kvalito])



*Karaj gekamaradoj,
Karaj gastoj,*

*Dum la kar jardekoj pasintaj post la venko
de la socialisma revolucio, nia popolo sub la
gvidado de la Bulgara Komunista Partio atin-
gis grandegajn sukcesojn ĉe konstruado de la ma-
teriala-teknika bazo de l'socialismo.*

*Dum tiu periodo kaj speciale post la Aprila
Plenkunsido de CK de BKP, en la centro de
atento de la partia politiko ĉiam estis la labor-
homoj kun iliaj bezonoj kaj interesoj, kun iliaj
celadoj kaj revoj.*

*Ni la komunistoj kaj la tuta bulgara popolo
prave fieras pri la sukcesoj de nia patrolando.
Laŭmerite pritaksante niajn atingojn, ni tamen
ne fermas la okulojn antaŭ la mankoj kaj mal-
perfektaĵoj, antaŭ la no-aj problemoj, aperan-
taj en la proceso de konstruado de la evoluinta
socialismo en PR Bulgario.*

En la nuna etapo la ŝlosila problemoj, kiu

*starigas antaŭ ni per sia tuta akreco kaj katego-
rieco, estas la problemoj pri kvalito.*

*Kompreneble, tiu ĉi problemoj ĉiam staris
antaŭ nia partio kaj ni solvadis ĝin laŭeble.
La akcenton tamen ni metis sur la kvantajn
indikojn, ĉar tio respondis al la objektivaj kon-
diĉoj, ĉe kiuj evoluis la lando.*

*Nun la situacio radikale ŝanĝiĝis. Antaŭ ni
staras la taskoj pri ĝenerala solvo de la prob-
lemoj pri kvalito kiel objektiva postulo, kiel
unuagrada teknologia, ekonomia, sociala, po-
litika kaj ideologia problemoj. Jen estas taskoj,
al kiuj oni devas alpaŝi laŭ nova maniero, per
novaj kriterioj.*

Kial?

*— Ĉar de la plenumo de tiu taskoj en plej alta
grado dependas la realigo de la kurso, starigita
de la XII partia kongreso — kurso de ĝenerala
intensigo de la nacia ekonomio;*

— de ties solvo dependas la plivastigo kaj pli-

profundigo de nia partopreno en la internacia distribuo de la laboro kaj en la socialisma ekonomia integreco;

— kun ĝia plenumo estas ligita la stabiligo de la defendokapablo de nia lando en la nuna komplika internacia situacio;

— de la ĝenerala solvo de la problemoj pri kvalito dependas finfine la senĉesa plialtigo de la materiala kaj kultura vivnivelo de ĉiu aparta homo, de la tuta popolo.

Jen kial ni rigardas al la problemoj pri kvalito kiel al ŝlosila problemoj ĉe la konstruado de matura socialismo en nia lando.

Nia devizo estas kaj devas esti: „Alta kvalito en ĉiuj sferoj de la vivo!“

Por plialtigi la kvaliton estas necese renovigi la ekzistantan teknikon, teknologiojn kaj produktadon sur la bazo de principoj novaj scienc-teknikaj atingoj. Lige kun tio estas necesa nova metodo de investado: 70—75% de la investaĵoj devas esti direktitaj al renovigo de la produktadkapacito per enkonduko de avangardaj teknologioj.

La sukceso en la batalo por alta kvalito estas nepensebla sen la kreolaboro de la bulgaraj sciencistoj. Atmosfero de multe pli alta estimo kaj rekono, de novaj kriterioj por morala kaj materiala pritakso de la inventoj kaj atingoj de la bulgaraj sciencistoj — jen kion ni bezonas nun pli ol kiam ajn.

La rilatoj inter la ŝtato kiel posedanto kaj la laborkolektivo kiel mastro havas treege gravan signifon por pliperfektigo de la nacia ekonomio.

De tio sekvas, ke ĉiu laborulo, ĉiu laborkolektivo devas esti rekte — materiale kaj morale — interesata pri la urga enkonduko de modernaj produktad-teknologioj kaj tekniko, pri ties plej efika utiligo, pri la produktado de altkvalitaj varoj.

Esenca ŝanĝo devas ekesti en la ligo inter kvalito kaj laborsalajro. La kvalito devas okupi avangardan pozicion en la sistemo pri materiala stimulado de la laboro.

Estas necesa ankaŭ nova metodo por profesia kvalifikado de la junularo. Nia tre grava celo devas esti: ĉiam pli grandaj grupoj de junaj laboristoj kaj agrikulturistoj akiru plej altan kvalifikon antaŭ sia 30-jariĝo.

Plej malfacila estas la problemoj pri kadroj. Precipe de ili dependas la ekposedo de novaj teknologiaj pozicioj kaj la produktado de altkvalitaj varoj.

La unueco de ekonomia kaj politika gvidado devas esti la unua kaj plej grava zorgo de la partio, de ĉiuj ĝiaj organoj kaj organizaĵoj en la batalo por alta kvalito.

La zorgo pri la kvalito estas zorgo pri la homo. Tio estas la plej profunda kaj inspiranta motivo de nia politika kaj ideologia laboro pri la problemoj de kvalito. Partopreno en la batalo por alta kvalito — jen estas la mezuro pri la vera valoro de ĉiu homo: en idea, politika, morala kaj profesia aspekto.

Ĉiu bulgaro devas ekvivi kun la konscio, ke la kvalito de ĉio produktata en nia lando estas atestilo pri lia propra profesia, civitana kaj persona digno, vizitkarto de socialisma Bulgario.

Ni estas konvinkitaj, ke la laborista klaso, la kamparlaboruloj kaj intelektularo, la partiaj, publikaj kaj ŝtataj organoj kaj organizaĵoj, ĉiuj laborkolektivoj akceptos la decidojn de la Nacia Partia Konferenco por Plibonigo de la Kvalito kiel sian plej gravan taskon kaj fardonos ĉiujn siajn fortojn, kapablojn, sciojn kaj volon por ilia transformo en realajn farojn.

ATENTON! NUMERO DE LA LEGANTO!

Por variigi la enhavon de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj por kontentigi la postulojn de la legantoj pri pli interesaj legaĵoj kaj pri pli ampleksa respiegulo de la organiza vivo de nia esperantistaro, la redakcio preparas n-ro 12/1984 precipe el materialoj, senditaj de la legantoj aŭ menditaj laŭ ilia propono kaj sugesto.

Ni petas ĉiujn distriktajn kaj societajn estrarojn vaste diskonigi tiun ĉi iniciaton de la redakcio inter sia membraro.

La plej interesaj materialoj estos premiitaj!

Estos aparte menciitaj la distriktoj, sendintaj plej multajn [materialojn por la „speciala numero de la leganto“!

Lasta limdato por ricevo de materialoj — 30-a de septembro 1984 — al la adreso de la redakcio: 1303 Sofio, bul. Ĥrsto Botev 97, por „Numero de la leganto“.

NI ATENDAS VIAJN KONTRIBUAĴOJN!

ESTIGU KUNAŬTOROJ DE NIA SPECIALA „NUMERO DE LA LEGANTO“!

ANTICIPAN DANKON PRO VIAJ MATERIALOJ, PROPONAJ, SUGESTOJ!

La redakcio de „BULGARA ESPERANTISTO“

ESPERANTO-KANTOJ KAJ PAROLO

EN PLOVDIV



La solena inaŭguro

Por dua fojo post 1968, de la 31-a de marto ĝis la 1-a de aprilo ĉi-jare, en la antikva sudbulgara urbo Plovdiv okazis la XVII Nacia Revuo de Esperanto-Kanto kaj Parolo — jam malnova, bona tradicio, unu el la plej gravaj aranĝoj en la jaraj planoj de Bulgara Esperantista Asocio.

Niaj plovdivaj samideanoj ambicie faris grandan preparlaboron por dece gastigi pli ol 500 partoprenantojn en la revuo — diversagajn kaj preskaŭ el ĉiuj loĝlokoj de la lando.

La 30-an de marto j.k. en la belega malnova Domo de Jurnalistoj en Plovdiv okazis gazetara konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de plovdivaj kaj de centraj amaskomunikiloj. Jordanka Anačkova, prezidantino de la Societo de Plovdivaj Jurnalistoj kaj ĉefredaktorino de Radio Plovdiv faris koncizan enkondukan paroladon, substrekinte la grandan interesigon, kiun elmontris la kultura socio pri tiu interesa esperantista aranĝo kaj donis la parolon al Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj prezidanto de la ĵurio por etuloj. Siaflanke li konigis al la ĵurnalistoj la karakteron de la revuo kiel kontribuo al la popularigo de Esperanto en nia lando kaj kiel faktoro por altiro de novaj, precipe junaj esperantistoj en la vicojn de BEA. Li rakontis koncize pri la aktivado, enlande kaj eksterlande, de la bulgaraj esperantistoj kiuj per korespondado konigas al siaj fremdlandaj amikoj la atingojn de nia popolo en la socialisma konstruado de nuntempa Bulgario. Pri la revuo mem informis la prezidanto de DE de BEA en Plovdiv Jordan Angelov kaj pri la instruado de Esperanto — Fani Mihajlova, sekretario de DE de BEA en Plovdiv. La ĉeestantoj starigis multajn interesajn demandojn kaj, kontentaj pri la deta-

laĵ respondoj, esprimis unuaniman deziron organizi kurson por lernado de Esperanto ĉe la Societo de Plovdivaj Jurnalistoj. La dommastroj plezure akceptis tiun proponon.

La solena inaŭguro de la revuo okazis la 1-an de aprilo matene en la salonego de kinoteatro „Geo Milev“, plenplena de partoprenantoj kaj gastoj.

La vicprezidanto de BEA inĝ. Petăr Todo-rov salutis la ĉeestantojn en la nomo de Centra Estraro de BEA kaj de ĝia prezidanto Hristo Gorov, bone konata al plovdivanoj, kaj konigis al ili la programon de la revuo. Li speciale dankis niajn plovdivajn samideanojn pro ilia sindona preparlaboro kaj ankaŭ la Distriktan Komitaton de Kulturo pro la ĉiufanka helpo kaj apogo.

Salutparolojn faris ankaŭ Margarita Ivanova, prezidantino de la Distrikta Komitato pri Kulturo en Plovdiv, Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA kaj prezidanto de la ĵurio por personoj aĝaj pli ol 16 jaroj, Steliana Dimitrova, prezidantino de Bulgara Esperantista Junularo. Ili ĉiuj bondeziris sukcesojn al la partoprenantoj en tiu originala konkuro.

Dum la tuta tago sur la podioj de kinoteatro „Geo Milev“ kaj de la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco, konvene ornamitaj, sonis Esperanto-kantoj kaj parolo. Antaŭ ambaŭ kompetentaj ĵurioj aperis kaj prezentis kantojn, muntaĵojn, recitis kaj oratoris individue kaj grupe inspiritaj plenumantoj de verkoj, dediĉitaj al la 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario. Forte impresis la bona kaj ambicia preparo, la varieco de la plenumoj kaj ilia sursceno, la arta maniero de prezentado, la strebo al nepra sukceso. Ĉi-sube ni donas la parolon al la kompetentuloj.

DONĈO HITROV, prezidanto de la ĵurio por etuloj:

— Granda honoro estas por mi, ke mi jam trian fojon prezidas la ĵurion por etuloj en tiuj specife bulgaraj esperantistaj manifestadoj. Do, tiu fakto donas al mi eblecon pri certa komparo, des pli ke mi renkontis en Plovdiv konatajn vizitaĵojn el antaŭaj revuoj kaj povis konstati ilian progreson. Mia ĝenerala impresoj pri la ĉi-jara revuo estas bona, pozitiva. Kreskas la nombro de partoprenantoj, videblas zorgema preparo precipe ĉe la individua recitado. Bonajn, esperigajn rezultojn montris Sinka Dimitrova el Ĉepelare, Iveta Cvetkova el So-

fio, Gjulten Kerimova el Târgoviște, Mariana Uzunova, Aneta Uzunova, Daniela Kirilova, Teodora Peteva kaj Daniela Ivanova el Haskovo. Evidenta estas la helpo de spertulo ĉe tiu forta „konstelacio“ el Haskovo. Bonege sin prezentis en individua recitado ankaŭ Mario Milčev el Slivnica, Stanimir Dinev el Botevgrad, Diana Slaveeva kaj Darina Radenkova el Svoge. Mia juna amiko Grigor Velinov el vilaĝo Blagovo estis iom necerta ĉi-jare — eble mia malbonhumoro pro akra kataro lin timigis? Tamen li ĉiam persistas kaj ŝatas „fortajn verkojn“, kiujn li pasie kaj kun kompreno plenumas. Li mem verkas kaj ni atendas de li bonajn surprizojn.

Ĉe la individuaj kantoj agrable nin ĝojigis Georgi Ivanov el Slivnica. Laŭ la eldiro de mia kolemino, la kantistino Maria Angelova, „eble tio estas iu nova bulgara Karuso?..“

Bonege sin prezentis kelkaj duetoj el Ĉepelare kaj Razgrad kaj — kiel kutime brile — la ensemblo por popolaj kantoj kun korda orkestro el vilaĝo Gorno Draglište (distrikto de Blagoevgrad).

Bone preparitajn kaj surscenigitajn muntaĵojn prezentis junpioniraj grupoj el Madan (artgvidantino Svetla Dieva), el Ĉepelare (artgvidantino Nikolina Takova), el Haskovo (artgvidantino Maria Beleva) kaj kortuŝe plenumis sian programeron la „papilia“ grupeto el 152-a infangardeno el Sofio (artgvidantino Maria Manolova). Laŭ mia opinio, „trovaĵo“ de la revuo en la grupo de etuloj estis la plenumo de infanoj el Bojuriŝte (sofia regiono). Ili vere ravis kaj ĵurion kaj publikon per sia gracia, lerta, ĝojiga, inteligenta kaj — precipe! — talenta prezentado. Ni aldonu ankaŭ ilian brilan Esperanto, kvankam ili lernas ĝin nur depost tri monatoj! Tiu ensemblo povus prezenti nin en la Asembleo „Standardo de la paco!“

Sendepende de la bonaj poentoj kaj la bonaj vortoj adresitaj al iuj supre menciitaj plenumantoj, la ĝenerala impresoj de la ĵurianoj pri tiu grupo estas, ke oni turnis pli da atento al la lingvo kaj malpli — al la arta prezentado. Ĉe iuj el la pli aĝaj plenumantoj oni konstatis palan, senpasian, preskaŭ formalan plenumon — ofendan kaj por ili mem, kaj por la aŭskultantoj!

Kaj tamen niaj revuoj de Esperanto-Paroto kaj Kanto kreskas! Ili altiras la plej belajn florojn el la bukedo da novaj esperantistoj en la tuta lando.

KUNĈO VÁLEV — prezidanto de la ĵurio por adoleskantoj kaj plenaĝuloj:


— Ankaŭ la ĉi-jara XVII Revuo montris, ke sur la kampo de amatora artaktivado nia asocio postrestas. La apartaj bonaj atingoj



Nina Kârgalieva kaj Sinka Dimitrova el Ĉepelare plenumas rodopajn popolkantojn. Gajnintoj de II premio.
Fotoj: Ĥristo Metev



„Infanoj de la mondo“ — muntaĵo, plenumita de infanensemblo el Bojuriŝte, artgvidanto kaj komponisto — Petâr Rusinov. Ili gajnis I premion (II grupo).



La ĵurio por etuloj unuanime aljuĝas plej altan poenton.

daŭre restas nur apartaj, pri kio neniel ni povas konsenti.

Sed ni estu konkretaj. Sur la scenejo de niaj revuoj ankoraŭ mankas alta artismo. Monotoneco kaj grizeco estas konstanta trajto de la pliparto el tio, kion oni montras. La plimulto de la plenumantoj nur aperas sur la scenejo, sed tute ne plenumas artisme siajn recitaĵojn kaj kantojn. Mankas nervo, dinamiko, diversaj intonacioj, mankas arta esprimpovo, sen kiuj mankas ankaŭ arto.

Granda parto de la plenumantoj verŝas superfluan, falsan patoson, ĉe ili mankas sincera, persona rilato al tio, kion la buŝo prononcas. Pezas ŝablono. Tial ilia recitado ne konvinkas, ne kaptas, ne emocias. Kaj pri gesto, mimiko, pozo — do, pri sceneja konduto — ni ne parolu! Guste tiuj ĉi mankoj kaj difektoj, pri kiuj ni parolas, plej serioze malaltigas la nivelon de niaj revuoj kaj recitaĵoj.

Kion ni diru pri la lingva nivelo de la plenumoj? Malheligo de neakcentitaj vokaloj, ofte prononcata malmola, kruda „l“, neklara elparolo de la vortaj finiĝoj, neklara prononco ĉe kantado — ĉio ĉi malbeligas la plenumon de poemoj kaj kantoj.


Kial tiuj difektoj kaj mankoj ripetigas en ĉiu nova Revuo? Ĉi tie aperas la gravega respondecado de niaj gvidorganoj. Ne ĉiu el la distriktaĵaj kaj societaĵaj gvidantoj fiksas energiajn, iniciatemajn respondeculojn de amatora artaktivado — ĝuste tiun personon, kiu povas el la kreiva entuziasmo de la partoprenantoj eltiri la plej bonan kaj direkti ĝin al la revuoj. Jam estas decida momento, por ke

niaj E-estaroj certigu kompetentan helpon al la partoprenantoj en la konkursoj: reĝisoron, aktoron, muzikiston kaj lingvoposedanton! Ne ĉiam kaj ĉie oni certigas fruan preparlaboron, konvenajn ejojn por provludoj, moralajn kaj materialajn stimulojn por la partoprenantoj.

Nun, post la gravega partia konferenco pri la kvalito, ni devas plej akre starigi la demandon pri decida plibonigo de nia amatora artaktivado. Niaj E-estaroj devas sin turni al la urbaj kaj distriktaĵaj Fakoj de Kulturo, kiuj efektivigos metodikan helpon en la preparlaboro por niaj artaj aranĝoj. Ege gravaj estas la anticipaj selektaj regionaj revuoj, kies ĵurnoj nepre devas esti kompetentuloj! Tial la problemoj de amatora artaktivado devas pli ofte stari en la tagordo de la kunsidoj de niaj E-estaroj. Oni devas pritrakti la demandon pri nacia konferenco de nia esperanta amatora artaktivado. Per komunaj fortoj vi povos fiksi la plej bonajn rimedojn por atingi decidan turnopunkton.

La amatora artaktivado tuŝas kelkmilojn de niaj membroj. Gi estas eksterordinare grava idea-estetika kaj lingva lernejo, kie prepariĝas novaj kadruloj, necesaj kaj por variigo kaj pliriĉigo de nia interna socia vivo, kaj por fortigo de nia propaganda laboro inter la vasta ekstera publiko.

La atento, la fortoj kaj la tempo, kiujn ni fordonos al la plibonigo de nia amatora artaktivado, estos centoble rekompencitaj!



Partoprenantoj kaj gastoj en la XVII Nacia Revuo de E-Kanto kaj Parolo — Plovdiv

LISTO DE LA PREMIITOJ

En la Nacia Revuo de la E-Kanto kaj Parolo

INDIVIDUAJ PREMIOJ

1—4 klasoj

RECITADO

- I Daniel Nedjalkov — Kazanlák
Juliana Petkova — Stara Zagora
II Aneta Uzunova — Ĥaskovo
Magdalena Văleva — Jambol
Ljubomira Budinova — Velingrad
Iva Spasova — Orjaĥovo
Donka Veleva — Ĥaskovo
Dobromir Panov — Gorna Orjaĥvica
III Janka Kaneva — v. Gălăbovo, distrikto de Stara
Zagora
Stanimir Dinev — Botevgrad
5—8 klasoj

RECITADO

- I Ŝinka Dimitrova — Ĉepelare
Daniela Kirilova — Ĥaskovo
Teodora Peteva — Ĥaskovo
Gjulten Kerimova — Târgoviște
Iveta Cvetkova — Sofio
II Mario Milĉev — Slivnica
Marina Uzunova — Ĥaskovo
Darina Raĉenkova — Svoge
Daniela Ivanova — Ĥaskovo
Grigor Velinov — v. Blagovo, distrikto de Mi-
hajlovgrad
III Sevdalina Paruŝeva — Jambol
Daniela Dimova — Târgoviște

KANTADO

- I Georgi Ivanov — Slivnica
III Sebile Selimova — Ŝumen

ORATORADO

- III Katja Delĉeva Koleva — Ĥaskovo

RECITADO

9—11 klasoj

- I Kalinka Stojanova — Razgrad
Diana Lozanova — Sofio
II Rumjana Paunova — Sofio
Petranka Petrova — Sofio
III Elena Baĥĉevanova — Pomorie
Pavlina Mihajlova — Svoge
Nadka Daskalova — v. Ŝiroka Lăka, distr. Smoljan
18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Antoaneta Panova — G. Orjaĥovica
Antoaneta Ĥristova — Ĥaskovo
II Krasimira Minĉeva — Sofio
Ivanka Pacirkova — Botevgrad
Dimităr Petkov — G. Orjaĥovica
III Nikolina Takova — Ĉepelare
Ivanka Markova — Varna

KANTADO

9—11 klasoj

- I Silvia Uzunova — v. Ŝiroka Lăka, distr. Smoljan

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Bonka Stefanova — Varna
Elena Nikolaeva — Varna
Dobrinka Todorova — Mihajlovgrad
II Balina Kaŝamska — Smoljan

ORATORADO

9—11 klasoj

- III Kalinka Borislavova — Sofio

18-jaraj kaj pli aĝaj

- II Blagovesta Uzunova — Ĥaskovo
Todor Todorov — St. Zagora

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

RECITADO

5—8 klasoj

- III Grupeto de E-societo „Roza valo“
(gvidanto Doĉka Dolapĉieva)
Grupeto el Dimitrovgrad

9—11 klasoj

- II Klubo de la Juna Esperantisto
(gvidanto Iva Ivanova) — Sofio
Grupo „Serdika“ (gvidanto Elena Simeonova) —
Sofio

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Grupo de E-societo „Prof. Asen Zlatarov“ (gvidanto
Nikola Pilev) — Ĥaskovo
Grupo de E-societo „Kulturo“ (gvidanto Veselina
Kurteva) — Plovdiv

KANTADO

1—4 klasoj

- II Ralica Drumeva kaj Radoslav Danov — Razgrad

5—8 klasoj

- I Kantgrupo (gvidantoj Donka Pârvanova kaj Donka
Mavrodieva) — Jambol
Folklorakantgrupo (gvidanto Murdin) — v. Gorno
Dragliște, distrikto de Blagoevgrad
II Ŝinka Dimitrova kaj Nina Kârĝalieva — Ĉepelare
Doĉka Trifonova kaj Dimitriĉka Stefanova
(gvidanto Radka Stojanova) — Razgrad
Kantgrupo (gvidanto Maria Rajĉeva) — Târgoviște

MUNTAJO

1—4 klasoj

- I Infangrupo el 152-a infangardeno en Sofio (gvidanto Maria Manolova) — Sofio
Grupo (gvidanto Jusna Arifova) el E-societo „Stelo“ — Kârgali
Grupo el E-societo „Prof. Asen Zlatarov“ (gvidanto Maria Beleva) — Haskovo
II Grupo (gvidanto Nikola Vasilev) — v. Koilovci, distrikto de Pleven
Grupo el E-societo „Vasil Levski“ (gvidanto Alena Minčeva) — Karlovo

5—8 klasoj

- I Grupo (gvidanto kaj komponisto Petâr Rusinov) — Bojurište, regiono de Sofio
Grupo (gvidanto Svetla Dieva) — Madan
Grupo el E-societo „Kulturo“ (gvidanto Veselina Kurteva) — Plovdiv
II Grupo (gvidanto Nikolina Takova) — Ĉepelare
III Grupo (gvidanto Ivanka Spasova) — Bankja
Grupo (gvidanto Emil Ĉirpanski) — Asenovgrad
Grupo el lernejo „Mitko Palauzov“ (gvidanto Lioneta Petrova) — Svoge

9—11 klasoj

- II Grupo el Gabrovo (gvidanto Rumjana Janeva)
III Grupo el Kubrat (gvidanto Helmie Merĝanova)

KANTADO

9—11 klasoj

- III Mariana Neševa kaj Mariana Nikolaeva — Ruse

KANTADO

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Bonka Stefanova kaj Elena Nikolaeva — Varna

GRUPA KANTADO

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Kantgrupo de E-societo „Lumo“ — Plovdiv
II Kantgrupo de E-societo „Septembra Gloro“ — Mihajlovgrad
III Kantgrupo en uzino „Mizija“ — Pleven

TEATRA PREZENTO

- II teatra trupo de E-societo „Prof. Asen Zlatarov“ (gvidanto Ĉaušov) — Haskovo

JURIO POR I KAJ II GRUPOJ

Prezidanto: DONĈO ĤITROV
Membroj: MARIA ANGELOVA
RADOSLAV DOJĈINOV

JURIO POR III KAJ IV GRUPOJ

Prezidanto: KUNĈO VĀLEV
Membroj: ANGELINA SOTIROVA
STEFKA KALIMENOVA

Plovdiv,
la 1-an de aprilo 1984

NOVAJ E-ELDONAĴOJ

Informa Libreto. 1983—1984. Sofio, BEA, 1982, 76 p., 14,2 cm.

Jankova-Bojaĝieva, Maria. La bulgara revolucia Esperanta gazetaro dum la periodo 1929—1934. Tradukis Lidia Raeva. Redaktis Nikola Aleksiev. Sofio, BEA, 1983, 79 p., 21,8 cm.

Kantoj pri la libero. Sofio, BEA, 1984, 43 p., 18,5 cm.

Kavalov, Jantaj. La Rodopa Falko. Rakonto pri la vivo de Diĉo Petrov. Tradukis Ivan Kovačev. Redaktis Ĥristo Gorov. Sofio, BEA, 1984, 48 p., 19,9×14 cm.

66 Bildoj por instruado de Esperanto. Sofio, BEA, 1983, 66 p., 32×22 cm.

Băcev, Marin kaj Elenov, Miĥail. Metodika gvidlibro por E-instruistoj en la grupoj por fakultativa lernado. Redaktis Ĥaĉik Ĥaĉikjan. Sofio, Ministerio de la Popola Klerigo, 1983. 155 p., 19,8 cm (aperis bulgarlingve).

Esperanto en servo de la patrolando. Jubilea kolekto. Kunmetis kaj redaktis Canko Murgin. Sofio, BEA, 1983, 133 p., 21,3 cm (aperis bulgarlingve).

Oljanov, Violin. Malfacilaĵoj en la facila Esperanto. Sofio, BEA, 1983. 71 p., 19,5 cm (aperis bulgarlingve).

Lige kun la 60-jara datreveno de la Septembra Ribelo 1923 aperis:

Konferenca programo. Scienc-Praktika Konferenco „60 jaroj de la Septembra Ribelo“, okazinta en Stara Zagora, 11—12. VI. 1983. Sofio, 1983, 7 p., 19,4 cm.

Gorov, Ĥristo. Ribela Kordo. Budapest, HEA, 1983. 71 p., 19,7 cm.

Septembra Ribelo 1923 — heroo batalo de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo. Referaĵoj, prezentitaj dum la scienc-praktika konferenco, dediĉita al la 60-a datreveno de la Septembra Ribelo 1923, okazinta la 11—12. VI. 1983 en urbo Stara Zagora. Sofio, BEA, 1983. 135 p., 20 cm.

Septembro estiĝos majo. Antologio. Kunmetis Nano Kjuĉukov. Redaktis Lidia Raeva. Sofio. Sofia-Pres, 1983, 198 p., 19,5 cm.

Velkov, Krum. Vilaĝo Borovo. Tradukis el la bulgara Asen Grigorov. Redaktis Violin Oljanov. Budapeŝto, HEA, 1983, 130 p., 19,5 cm.



REMEMOROJ PRI MIA FRATO DIĈO



Ni elkreskis en malriĉa laborista familio. Kvar infanoj kaj nia patrino estis vivtenataj de nia patro, kiu ofte restis senlabora. Li tamen havis pozitivan rilaton al la klereco. Mia frato Diĉo vizitis ĉiutage la lernejon en la najbara vilaĝo Ĉepelare, kaj la distancon ĝis tie li trapasadis ĉiam piede. Post la fino de la antaŭgimnazia kurso li enmatrikuliĝis en la eksperimenta Agrikultura Pedagogia Lernejo en urbo Sumen. Hejme li revenis nur dufoje en la jaro po unu monaton — dum la novjaraj ferioj kaj dum la somero. Ni senpacience atendis lin tiutempe. Tio estis festaj tagoj por nia tuta familio. Ĉiutage li ludis al ni violonon.

Post la fino de la lernejo en Sumen mia frato fariĝis instruisto en la najbara vilaĝo Sokolovci.

Post dujara instruado en Sokolovci kaj Sâr-

nica, ekspertinte la mizeron de nia landparto, mia frato enskribiĝis en la Skolo de Rezervaj Oficiroj en Sofio. Post tio li jam regule venadis hejmen dum ĉiuj mallongaj ferioj, kiam ŝatis rakonti al ni pri siaj ideoj. La oficira provtempo en Sliven tiel impulsis lin, ke dum unu ferio preparolis kun ni emociajn okazojn pri la luktoj de la laboristoj en urbo Sliven. Krome, mia frato Diĉo estis inventinta rimeдон apartigi el la produktoj ĉe la intendanta fako por helpi eksterleĝulojn kaj politikajn malliberulojn.

Dum unu el liaj lastaj libertempoj mia frato venis la 9-an de aŭgusto, kiam en la loko „Roĵen“ oni aranĝis grandan foirfeston.

—Ĉu vi scias, rigardante kiom da multnombra amaso estas kunveninta,—al mi venas la penso, ke tiu popolo estas tre bona kaj se estas iu, kiu povus ĝin gvidi, ĝi povus miraklojn efektivigi — diris mia frato Diĉo.

—Kion vi parolas, filo? Mi timas viajn parolojn — diris mia patrino.

—Alian aferon mi pripensis, panjo, sed nun mi ankoraŭ ne scias kiel realigi ĝin.

La lasta veno de mia frato okazis en januaro 1943. Pro malsano mi estis devigita interrompi mian studadon en la gimnazio en Asenovgrad kaj li kunprenis min al Make-donio.

En Konsko, kie troviĝis lia landlima posteno, mi restis 7 monatojn.

Mia frato estis kreinta fortan kolektivon. Kun siaj soldatoj li havis amikajn rilatojn, kaj ili estimis lin. Li variigis ilian vivon, ĉar krom la militlernado li instruis al ili agrikulturon kaj gajigis ilin per sia violono. Li jam havis bonajn ligojn kun la progresema junularo kaj ilia grupo vivis sangoplenan vivon. Plej proksima kamarado de mia frato estis Nikola Tonĉev. Mi tre bone rememoras kiom maltrankviligitaj venadis liaj kamaradoj por interŝanĝi kun li pensojn pri la avancado de la germanoj sur la Orienta Fronto. Mia frato ĉiam dispelis iliajn dubojn per la vortoj: „Mi vidos kion spertos la germanoj de la rusa boto!“

Kiam la gazetoj komunikis pri la okupo de Stalingrad, ĉiujespere oni malfermis la geografian karton kaj Diĉo klarigis al la grupo la sekvantajn marŝojn de la sovetaj armeoj.

Preskaŭ ĉiam, kiam mia frato vizitis Gevgeli, mi akompanis lin. Ĉe tiuj okazoj ni regule trapasadis vilaĝon Moin. Tie ni vizitis la lokan leŭtenanton, sed nia rekta celo estis renkontiĝi kun la instruisto Atanas Karaĝov. Dum la somero oni sendis en Konsko grandan grupon da soldatoj, por kontraŭagi la partizanojn. Mia frato koleriĝis kaj incitiĝis:

— Mi gvidos ilin postkuri la venton, kaj

krome ni jam interkompreniĝis kun la partizanoj. Se ni trafus embuskon, ni pafos en la aero, ĝis kiam ili eltiriĝos.

Dum unu nokto li maltrankviliĝis pro du soldatoj, kiam ili survoje al sia posteno pri-rabis unu karakaĉanon. Eluzinte ĉiujn siajn pedagogiajn spertojn, mia frato devigis la ŝtelistojn rekoni sian agon kaj redoni la monsumon al la pirabito.

Estas ankoraŭ multaj ekzemploj, kiujn oni povus rakonti pri lia kora rilato al la made-dona loĝantaro.

Ĉe la forveturo al Bulgario mia frato Diĉo akompanis min ĝis la vagonaro en Gevgeli,

ĉirkaŭprenis min je adiaŭo kaj liaj okuloj pleniĝis per larmoj. Mi neniam antaŭe estis vidinta lin en tia stato.

En sia lasta letero post tiu okazo li skribis: „Jam venis ankaŭ mia vico, mi plu ne povas toleri tiun staton. . . Al Hitler mi ne deziras servi plue. . .“

Dum tiuj tagoj, 40 jarojn post la trairo de mia frato Diĉo Petrov kune kun ĉiuj soldatoj el la subregiono al la flanko de la partizanoj, mi kun sento de fiereco deklaras, ke mi gardos kiel trezoro liajn testamentojn.

STANKA PETROVA

(El la bulgara tradukis: IVAN KOVAČEV)

RODOPA FALKO

„La Rodopa Falko.“ (Subtitolo — Rakonto pri la vivo de Diĉo Petrov). Aŭtoro: Jantaj Kavalov. Eldonaĵo de CE de BEA, Sofio, 1984, 47 paĝoj, formato 19,8x14 cm.

La ĵus aperinta libreto-broŝuro sub titolo „La Rodopa Falko“ jam ĉe la unua paĝo kaptas la atenton de la leganto. Aplaudindaj estas la klopodoj eldoni la interesan rakonton de **Jantaj Kavalov**, bulgarlingve aperintan en 1957 kaj nun tradukitan en Esperanton de nia E-veterano Ivan Kovaĉev.

La bulgara E-movado dum la periodo de monarko-faŝismo donis multajn viktimojn. La nun traktata broŝuro plenigas grave senteban vakuon en la bulgara E-literaturo — ĝi estas altvalora beletra kaj historia verko ne nur pri Diĉo Petrov, la legenda heroa komandanto de la unua soldata partizana bataliono „Aristo Botev“, sed ankaŭ pri la komuna agado de la balkanlandaj popoloj en la antifaŝista batalo.

La aŭtoro feliĉe sukcesis eviti la tradician sekan, foje statistikan biografion, plenŝtopitan per amasego da epizodoj, faktoj, datoj impresoj ktp., kaptante la plej gravajn momentojn el la ŝtormoplena vivo de Diĉo Petrov — „La Rodopa Falko“, ameme kromnomita tiel de liaj kamaradoj-partizanoj kaj pereinta en kruela batalo en sia 25-jara aĝo.

Kiel sur filmbendo, sed ankoraŭ pli senpere kaj intime, antaŭ ni prezentiĝas kvindekda blankaj dometoj de la vilaĝo Progled, naskiĝloko de Diĉo, lia ekskluziva avido al konoj, la rolo de la unua instruisto, „laŭ ekstera aspekto tre simila al la nacia poeto Aristotelo Botev“, la influo de batalantoj por libero kiel V. Levski, Ĥaĝi Dimitar k.a. Poste — aŭtodidakta lernado de Esperanto, studado en agrikultura-pedagogia lernejo en Sumen, arda

amo al la muziko kaj aparte al la popolkantoj-kontaktoj kun progresema instruisto, legado de progresema literaturo, militservo en oficerlernejo; estro de komandejo ĉe la suda landlimo en Konsko, aranĝo de soldata E-kurso kaj kurso por analfabetoj, pluaj kontaktoj kun antifaŝistoj, renkontiĝo kun la instruistino Nadja, laŭ kiu amo kaj batalo estas nedisigeble ligitaj: „... en Jugoslavio estas amasa la partizana batalo. Se vi aliĝos, ankaŭ mi venos, tuj forlasos mian oficon. . .“ Sekvas lia renkontiĝo kun la partizanestro Trifon Balkanski, la alvoko de Diĉo al la soldatoj de la roto en decembro 1943: „Kamaradoj! Venis la decida horo. Ni jam estas partizanoj!“ Kaj fine — la longa vojo de la soldata partizana bataliono al Jugoslavio kaj denove al Bulgario, la heroa pereado de la bravulo-kolonelo en batalo kontraŭ la faŝista ĝendarmaro kaj polico apud vilaĝo Batulia, la 23-an de majo 1944.

Konklude mi volus noti kelkajn pli gravajn lingvajn malsukcesojn de la traduko. Temas pri ofta netrafa uzo de la prepozicioj **de**, **el**, **kun**, trouzo aŭ neuzo de la artikolo **la**, neuzo de akuzativo (ekz. invado en Rusio, p. 14); en la lernejo. . . venis, p. 15). Estas ankaŭ certa kvanto da erare uzitaj vortoj: **kalka-numo** anstataŭ **kalkano** (p. 8); uzo de **daŭrigi** en senco de **plu iri**, **plu marŝi** (p. 44) k.a. Mi rimarkis eraran uzon de **voki**, anst. **krii** (p. 30, 34, 35, 37). Krome, pli taŭga estas **Sredna Gora** ol **Meza Montaro** kaj **Stara Planina** devas havi la klarigon **Balkano**. La kelkaj preseraroj (p. 25, 32, 38, 46) feliĉe ne malhelpas la komprenon de la teksto.

ASEN JOSIFOV, sekretario de
Instruista Societo „DIĈO PETROV“ — Sofio



MEMORE AL ADA

La 14-an de marto j.k. en Sofio okazis solena kunveno organizita de la Sofia Esperantista Kulturcentro „M. Gorkij“ honore al la 3-a datreveno de la forpaso de Atanas D. Atanasov — eminenta bulgara esperantisto-filologo, pedagogo kaj tradukisto, unu el la plej grandaj figuroj en la bulgara E-movado.

Raporton pri la vivovojo kaj grandega kontribuo de ADA al la bulgara E-movado faris la ĝenerala sekretario de BEA Kunčo Válev.

Violin Oljanov, ĉefredaktoro de revuo „Paco“, prezentis antaŭ la ĉeestantoj la postmorte aperintan gravan verkon de ADA „La lingva esenco de Esperanto“, detale traktante la pli gravajn problemojn tuŝitajn de la aŭtoro.

La solenaĵo finiĝis per legado de originalaj verkoj kaj tradukoj de ADA.

Ĉi-sube legu la ĉapitron „Propraj esprimoj de Esperanto“ el la verko de Atanas D. Atanasov „La lingva esenco de Esperanto“.

Esperanto, kiel ĉiu vivanta lingvo, ne povas resti senmova. Paralele kun la vivo, ĝi ankaŭ evoluas kaj adaptiĝas al la novaj cirkonstancoj kaj postuloj. Ju pli vastiĝas ĝia aplikado, ju pli ĝi penetras profunde en diversajn sferojn de la scienco, arto, sporto ktp., des pli aperas bezono pri enkonduko de novaj vortoj kaj per tio la lingvo konstante, senĉese perfektigatas kaj estas ĉiam taŭga por diversaj bezonoj de la nuntempo.

Krom enkonduko de novaj vortoj por esprimi la pensojn laŭ la intelekto, la lingva kutimo kaj la esprimmaniero de la nuntempaj kulturaj homoj, ofte estas bezonataj novaj sintaksaj kompleksoj, novaj stilaj parolturnoj. Ankaŭ ĉi tie ni devas emfazi, ke tia formado de novaj esprimoj ne devas sekvi blinde naciajn modelojn (kiuj ofte ne estas plej bonaj kaj plej logikaj), sed ni devas utiligi antaŭ ĉio la internajn eblojn de Esperanto mem.

Sed kelkaj aŭtoroj en siabona deziro gardi Esperanton kontraŭ nebonaj konstruoj de frazoj sub influo de nacia lingvo, venas al ekstrema kaj riproĉas la enkondukon de iuj sintaksaj uzoj, trovante ilin nekorektaj, neblaj, kontraŭzamenhofaj, kontraŭaj al la spirito de Esperanto. Tiel, ni aŭdas kaj legas mal-



Malfermo de la solena kunveno

aprobajn pri la senpera verbigo de adjektivoj (kiaj: tio ne gravas, vi pravas kc.).

Mi opinias, ke tiaj kritikoj kaj riproĉoj estas troaj kaj esprimas tendencon kateni la lingvon al limigitaj modeloj, kvankam la menciitaj uzoj ne estas kontraŭfundamentaj kaj ne nur malutilas la lingvon rilate al ĝia beleco kaj klareco, sed donas eblon variigi la stilon, sekvrante la internan inercion de Esperanto.

Ordinare tiaj kritikantoj bazas sian vidmanieron sur la modeloj, hereditaj el la verkoj de Zamenhof. Tamen ili venas al troigo en la pritakso. Cetere ni devas difini klare nian rilaton al la kreinto de la internacia lingvo kaj al la lasitaj modeloj en liaj verkoj. Ju pli ni malproksimiĝas de la tempo, kiam li vivis, verkis kaj parolis, des pli antaŭ niaj okuloj aperas la grandiozeco de lia persono kaj de lia kreaĵo. Sed en tia aprezo ni ne atingu ian idolismon. Zamenhof estis ja homo kaj ankaŭ li evoluis en siaj komprenoj. Certe se oni atente legas kaj trastudos liajn verkojn, oni rimarkos diferencojn inter lia uzado de la lingvo — temas pri lia stilo — en la unua periodo post la ekvivo de Esperanto kaj en la lastaj jaroj de lia literatura agado. Sendube li plej intime sentis la spiriton de la lingvo kaj plej trafe kaj sukcese utiligis ĝiajn internajn povojn por krei esprimojn, respondajn al la subtilaj nuancoj de la penso. Sed certe li ne elĉerpis ĉiujn eblecojn de la lingvo en tiu rilato, kiuj — mi emas diri — estas preskaŭ senlimaj. Post li talentaj Esperanto-verkistoj alportis gravan kontribuon por la plua evoluo de la lingvo kaj la pliriĉigo de ĝiaj esprimkapabloj.

Parolante pri la formataj esprimoj kaj pri

enkonduko de novaj kombinoj el la elementoj de Esperanto, ni ne neglektu ankaŭ la rolon kaj signifon de la kunteksto; ĝi helpas por klara kaj ĝusta kompreno de la signifo de vortoj kaj esprimoj. Sintakse oni povas konstrui variajn propoziciojn el apartaj elementoj, kondiĉe ke per ili ne estu malrespektataj kaj rompataj la fundamentaj gramatikaj reguloj.

Zamenhof mem uzis tiun liberecon, pri kiu estis la parolo; al lia plumo apartenas vortoj kiaj: „Hundo bojas, homo vojas“. „Kiu forton ne havas, ĉiam malpravas“. Kion faras do tiuj esperantistoj, kiuj uzas ekzemple la esprimon „Vi ne pravas!“? — Ili sekvas unu el la modeloj de Zamenhof. La logika, senca analogio estas risorto por la normala evoluo de la lingvo.

Mi ree emfazas: Esperanto ne devas esti lingvo rigida, limigita en malvastaj limoj; ĝiaj elementoj, sekvanse la gramatikajn prin-

cipojn de la Fundamento, povas esti kunigitaj en plej diversaj kombinoj kaj per tio ĝia esprimkapablo estos plifortigata.

Zamenhof mem plurfoje parolis pri la evoluo de la internacia lingvo. Li neniam kredis, ke la kreita de li bazo prezentas definitivajn kadrojn, kiuj limigus ĝian pluan pliriĉigon, laŭigon al la postuloj de la vivo. Tiun pravan rigardon al la estonteco de la lingvo, tiun senton pri la natura lingva evoluo kelkaj sciencistoj-filologoj konsideras, interalie, kiel unu el la geniaj trajtoj de la verko de Zamenhof.

La sama kompreno pri la evoluo de la internacia lingvo estas klare eldirita ankaŭ en la Deklaracio de Esperanto, akceptita de la Unua Universala Kongreso en Bulonjo sur Maro en 1905.

ATANAS D. ATANASOV (ADA)

ni recenzas



„ANATOL EN ESPERANTO“

Aŭstria Esperanto-Instituto entreprenis la eldonon de Esperanta versio de kvin unuaktaĵoj sub komuna titolo „Anatol“, kies aŭtoro estas la konata verkisto Arthur Schnitzler (prononcu Snicler).

Schnitzler estas interesa persono, reprezentanto de la iama viena intelektularo. Li vivis dum la lasta triono de la pasinta kaj la unua triono de XX jarcento. Filo de kuracisto, li mem fariĝis kuracisto post la fino de siaj studoj en la medicina fakultato de Viena universitato, kun granda famo en Eŭropo.

La aŭtoro apartenas al la moderna literatura grupo de t. n. „impresionistoj“. Kiel verkisto li decide rezignas la socialan problemaron kaj orientiĝas firme nur al „eternaj“ temoj: amo kaj morto. Sed malgraŭ tio, en siaj plej talentaj verkoj li manifestiĝas kiel kritika realisto. Ekzemple, en sia rakonto „Leŭtenanto Gustl“

li majstre bildas la malmoralan fizionomion de la aŭstriaĵoj oficiroj. Kulpigite en „ofendo al la honoro de l'armeo“, oni senigis lin de la titolo „armea kuracisto“.

En siaj unuaktaj scenoj, dramoj, komedioj, rakontoj li fakte senmaskigas la vantecon kaj la kruelecon de la mondumaj konsumantoj de l'vivo. La aŭtoro tamen esprimas certan simpatian al siaj herooj, kondamnante samtempe ilian vivmanieron.

Por la verkaro de Schnitzler estas karakteraj rafinita psikologiismo, akra intereso al la intima vivo, al la problemoj de amo kaj morto. Samtempe li prezentas la amon precipe kiel erotikon. Lin altiras antaŭ ĉio la subkonsciaj, neraciaj, patologiaj fenomenoj de la homa psiko. Estas sentata ĉe li la influo de la famiginta tiutempe aŭstra psikoanalizisto S. Freud (Frojd).

En la kolekto „Anatol“ ĉiuj unuaktaĵoj posedas tipan por Schnitzler enhavon kun la karakteraj por lia verkmaniero elementoj. Ili ĉiuj objekte reflektas la vivmanieron de la supera socio en Vieno dum la periodo de subiro kaj disfalo de la iam potenca Aŭstro-hungara imperio, ruiniĝinta post la fino de la Unua Mondmilito.

Schnitzler estis fama eŭropa moderna verkisto. Liaj verkoj, precipe la dramoj, estis tradukataj kaj enscenigataj tra tuta Eŭropo. La bulgara Nacia Teatro ankaŭ multfoje prezentis ilin dum la 20–30-aj jaroj.

Schnitzler restas interesa aŭtoro ankaŭ en nia epoko, ĉar en belarta formo li liveras al la nuntempa legantaro multajn sciojn pri tiu interesa periodo de la eŭropa historio, ofte nomata „fino de l'jarcento“.

La lingvaĵo de la tradukoj, faritaj de konataj aŭstriaĵoj esperantistoj, estas bonstila, flua, preskaŭ senripoĉa, tre facile legebla.

NIKOLA ALEKSIEV

EMOCIOJ DE RADA

IVAN VAZOV

Rada estis alta, svelta kaj bela knabino, kun simplanimaj klaraj okuloj, aminda, pura kaj helkolora vizaĝo, kiun la nigra kaptuko aspektigis pli bela.

Lastatempe Rada estis tre okupata en la lernejo, ĉar proksimiĝis la jara ekzameno. Ties tago rapide venis. Jam de la mateno la knabina lernejo komencis pleniĝi de lernantinoj, feste vestitaj, glatkombitaj kaj ornamitaj kiel papilioj fare de iliaj patrinoj. Kun malfermitaj libretoj ili zumadis kiel svarmo da abeloj kaj por lasta fojo ripetadis siajn lecionojn.

La diservo en la preĝejo jam finiĝis kaj homoj komencis amase eniri la lernejon, por vidi laŭkutime la jarajn sukcesojn de la lernantinoj. Belegaj florkronoj ornamis la pordojn, fenestrojn kaj la katedron; la bildoj de la sanktaj Kiril kaj Metodij rigardis el mirinde bela kadro el rozoj, freŝaj floroj, branĉetoj de piceo kaj bukso.



Cirilo kaj Metodio — kreintoj de la slava skribo.

Grafikaĵo: Penĉo Kulekov.

Rada singene ordigis la lernantinojn sur la benkojn kaj mallaŭte donis al ili kelkajn instrukciojn. Sia aminda vizaĝo, vivigita de emocio pro la solena horo kaj lumigita de ŝiaj grandaj okuloj, estis ĉarme belega. Diafanaj rozkoloraj nubetoj, ludantaj sur ŝiaj vangoj, perfidis la vibradon de ŝia animo.

La lernobjekto, pri kiu oni ekzamenis, estis bulgara historio. La instruisto Kliment turnis sin kun la libreto al Miĥalaki Alafranga, Miĥalaki kapneis kaj diris, ke li ekzamenos pri la franca lingvo. La instruisto turnis sin dekstren kaj ripetis la inviton al Stefcov. Li konsentis, metis la libron sur la tablon kaj laŭte starigis demandon. La demandata junulineto silentis. La glacia, malafabla rigardo de Stefcov penetris kiel frosto en ŝian infanan animon. Stefcov ripetis la demandon. La knabino silentis plu.

— Si iru al sia loko — li diris seke al la instruistino, — alvoku iun alian.

Eliris alia knabino antaŭen. Stefcov demandis ŝin. Si aŭdis, sed ne komprenis la demandon kaj restis silenta. Silenta estis ankaŭ la tuta publiko, ekposedita de ia peniga sento. Stefcov jetis glaciigan rigardon al Rada kaj ekgrumbilis:

— Sufiĉe malzorgeme oni estas instruinta la infanojn. Alvoku alian lernantinon.

La tria lernantino respondis ion tute alian. Vidinte malaprobon en la rigardo de Stefcov, ŝi ekmiris kaj senespere ĉirkaŭrigardis. Konfuziĝo nebuligis ŝian rigardon, ŝiaj lipoj ek-tremis. Subite ŝi laŭte ekploris kaj forkuris, kaŝinte sin ĉe sia patrino.

Rada estis konsternita. Eĉ guto da sango ne restis en ŝia vizaĝo.

La publiko ne plu povis elteni tiun streĉitan staton kaj ekbruis maltrankvile. Nur sur la triumfanta vizaĝo de Stefcov pentriĝis kontento.

Subite ekregis tomba silento kaj ĉiuj rigardoj direktiĝis antaŭen. El la publiko eliris Bojĉo Ognjanov, kiu ĝis nun staris nerimarkite kaj turninte sin al Stefcov, diris firme:

— Sinjoro, mi ne havas la honoron koni vin, sed pardonu. Viaj demandoj, malklaraj kaj abstraktaj, povus embarasi eĉ lernantinojn de la V klaso. . . Kompatu tiujn ĉi nespertajn infanojn. . .

Kaj, turninte sin al Rada, li demandis:

— Fraŭlino, ĉu vi permesos?

Kaj, ne sidiginte, li petis, ke oni alvoku unu el la jam ekzamenitaj knabinoj.

La vizaĝoj de la ĉeestantoj sereniĝis, la brustoj libere ekspiris.

Tute simple, Ognjanov demandis la knabinon pri la sama aĵo, pri kiu demandis ŝin ankaŭ Stefcov. Nun ŝi respondis. Oni alvokis alian knabinon. Si ankaŭ, laŭ sia aĝo, respondis kontentige.

Tiam ĉiuj infanoj, timigitaj terure antaŭ kelkaj minutoj, fiksas amike siajn rigardojn al Ognjanov; ili nun eĉ komencis disputi, kiu el ili eliru la unua, por interparoli kun tiu bona homo, kiun ili jam ekamis.

Mirigita, kortuŝita ĝis larmoj, surprizita, Rada rigardis dankeme al tiu grandanima homo, kiu helpis ŝin en tia peza minuto.

Al la tria knabino Ognjanov starigis la demandon:

— Rajna, diru al mi, ĉe kiu bulgara caro la bulgaroj fariĝis kristanoj, estis baptitaj?

Kaj li rigardis milde kaj amike la senkul-pajn okuletojn, turnitajn al li, en kiuj ankoraŭ vidiĝis spuroj de larmoj.

La knabineto pripensis iom, ekmovis siajn lipojn kaj per voĉeto klara, dolĉa kaj sonora kiel de alaŭdo, kiu kantas frumatene en la aero, ekkriis:

— La bulgara caro Boris baptigis la bulgarojn!

— Tre bone, brave, Rajna. . . Diru nun al mi, kiu inventis nian alfabeton?

Tiu demando iom embarasis la knabinon. Si preskaŭ fermis la palpebrojn, kvazaŭ por alvenigi al si la respondon, malfermis la buŝon por diri, sed haltis hezitante, jam preta konfuziĝi.

Ognjanov helpis ŝin:

— Nian A, B, C, Rajna, kiu verkis ĝin?

La infana rigardo eklumis. Rajna etendis sian ĝis la kubuto nudan delikatan brakon, ne dirante ion ajn. Ŝi montris al Kiril kaj Metodij, kiuj rigardis favore al ŝi.

— Jes, jes karulineto, la sanktaj Kiril kaj Metodij, aŭdiĝis kelkaj aliancanaj voĉoj de la antaŭaj seĝoj.:

— Longan vivon donu al vi Dio, Rajna! La sanktaj Kiril kaj Metodij helpu vin iĝi carino — kortuŝite elbabilis popo Stavri.

— Brave, Rajna, sidigu — afable diris Ognjanov.

Ridante pro ĝojo kaj komsciante sian triumfon, Rajna alkuris al sia patrino, kiu ĉirkaŭbrakiskaj premis ŝin al sia brusto, surŝutante ŝin per ŝtormaj kisoj kaj larmoj.

Ognjanov turnis sin al la instruisto Kliment kaj redonis al li la libron.

La ekzameno daŭris plu kaj finiĝis tute trankvile.

(„SUB LA JUGO“, fragmentoj el la ĉapitro „Emocioj de Rada“)

poezio

DENA KAJ VENUSO

(Bulgara popola kanto)

Dena enkorte iradis,
malgrandajn larmojn verŝadis
kaj rigardadis ĉielen.
Ĉiele lumas Venuso,
Dena Venuson demandis:

— Venuso, kara fratino,
lumante alte de supre
kaj rigardante vastegen,
supren, fratino, malsupren,
ĉu vi ne vidis Nikola'n —
Nikola'n junan bandestron,
en iu verda arbaro,
gvidanta bandon fidelan
el sepdekkelkaj bandanoj
nur elektitaj bravuloj?

Sciigu al li, Venuso,
kion ajn farus Nikola,
li sian bandon dissolvu
ĉar min, fratino, afflitis,
afflitis ankaŭ ĉagrenis,
ke min Nikola forlasis
sub novedzina vualo,
memstarulino tutsola:
sola mastumi la domon,
sola ordigi la korton,
sola kulturi la agron,
la agron kaj la vitkampon.
Ĉar min krom tio afflitis,
afflitis ankaŭ ĉagrenis,
ke min Nikola forlasis,
kaj min kompatas la homoj,
la homoj, franjo, najbaroj,
najbaroj ankaŭ parencoj:
„Kiel Nikola ja povis
sian Denica'n forlasi
sub novedzina vualo,
memstarulino tutsola,
bela kaj bele vestita
samkiel rozo ĝardene?“
Kaj al mi, franjo, satedis,
satedis, kaj min ĉagrenas,

ke bopaĉjo kaj bopanko
malalte teren rigardas,
ĉiam inter si parolas,
parolas, pri mi aludas.
Sed plej multe al mi, fratino,
satedis kaj min ĉagrenas,
kiam por akvo mi iras,
iras mi kaj revenas,
ke min la centestro atendas,
por gustumtrinki de l'akvo,
por min rigardi okulen
kaj al mi diri ĉi-vortojn:
„Dena, virino belega,
belega ankaŭ ĉarmega,
vi havas korpon-arbido,
okulojn kvazaŭ ĉerizoj,
brovojn kiel galonoj,
vizagon blankan kaj ruĝan
samkiel pomo somera:
ĉu do ne estas domaĝe,
estante belega kaj juna,
se vi ne havas karulon?“
Silentas stelo Venuso,
tamen al Dena ŝi diris:
— Ho, belulino Denica,
juna edzino hajduka,
hieraŭ mi vidis Nikola'n
kun lia bando elita.
Bandanoj manĝas kaj trinkas,
sur blanka ŝtono li sidis,
sur blanka ŝtono natura,
ne manĝas Nikola, ne trinkas,
nur al mi ofte rigardas,
rigardas, al mi parolas:
Venuso, kara fratino,
sciigu, franjo, al Dena,
al mia bela edzino,
ke mi por Dena preparis,
belan kostumon hajdukan,
longtuban fusilon bontrafan
kaj akran sabron elastan,
krome — dutubajn pistolojn,
ke Dena ĉe mi alvenu,
antaŭ la bando por marŝi,
la verdan standardon flirtigi!“

El la bulgara: DIMITAR HĤAGIEV

DU JUBILEAJ

LIBROKOLEKTOJ

En 1982 la bulgaraj esperantistoj solene festis tre gravan datrevenon — la 75-jariĝon de la Bulgara Esperantista Asocio (1907—1982). Okaze de tiu hela jubileo la Centra Estraro de BEA eldonis du librokolektojn kun skizoj, artikoloj, rememoroj pri historiaj E-eventoj, epizodoj, E-agantoj, pioniroj, veteranoj ktp. La unua kolekto „Skizoj pri la historio de bulgara Esperanto-movado“ aperis en 1982, la dua, bulgarlingva eldonaĵo — „Esperanto en servo de la patrolando“ — fine de 1983. Aŭtoroj estas — en la unua kolekto: Hristo Gorov, Nikola Aleksiev, Ivan Keremidĉiev, Krăstju Karucin kaj Canko Murgin. En la dua: Hristo Gorov, Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Canko Murgin, Krăstju Karucin kaj Kunĉo Vălev. Krom ili kontribuis per materialoj ankaŭ aliaj bulgaraj E-aktivuloj kaj ankaŭ docento J. L. Portnoj el Kazahstana SSR kaj d-ro Detlev Blanke el GDR. Multaj el la skizoj aperis en ambaŭ kolektoj — en la unua en Esperanto, en la dua — bulgarlingve.

En „Esperanto en servo de la patrolando“ tamen aperis pli multe da titoloj — same necesaj kaj interesaj. Ĉiuj aŭtoroj lerte priskribas gravajn momentojn el la historio de la bulgara E-movado, prezentas skizojn pri elstaraj E-pioniroj kaj veteranoj. En la skizo de Hristo Gorov — prezidanto de BEA, „75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio (1907—1982)“, substrekante, ke Bulgario estas unu el la landoj, kie la Internacia Lingvo trovis plej favorajn grundon kaj kondiĉojn por evoluo tuj post la kreo de la verkoj de L. L. Zamenhof pri Esperanto, la aŭtoro priskribas diversajn periodojn el la E-movado en Bulgario, menciante nomojn de E-aktivuloj kaj veteranoj, kiel Asen Grigorov kaj Nikola Aleksiev, Atanas Lakov kaj Ivan Keremidĉiev, Krăstju Karucin, Violin Oljanov, Angel Ivanov (Angelo), Canko Murgin, d-ro Stojan Guĝev kaj aliaj.

C. Murgin respegulas la vivon kaj agadon de la unua bulgara esperantisto kaj inicianto de la E-movado, aŭtoro de la unua E-lernolibro en la lando d-ro Miloslav St. Bogdanov. La sama aŭtoro en aliaj materialoj skribas pri la E-pioniroj Nikola Dimitrov Kovaĉev kaj Hristo Haralambiev kaj aparte pri la bulgaraj E-poetoj.

Hristo Gorov — mem veterano kaj E-verkisto kaj poeto — en du aliaj skizoj skribas pri la veterano Ivan Haĝi Krăstanov kaj pri partopreno de la esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo. La veteranoj N. Aleksiev kaj

As. Grigorov ankaŭ donas interesajn materialojn — la unua pri „50 jarojn Laborista Esperantista Asocio“, „Bulgara E-Asocio dum la periodo 1960—1981“ kaj „G. Dimitrov pri la E-movado“. La dua — As. Grigorov, notas la favoran rilaton de G. Dimitrov al Esperanto.

Estas ankaŭ artikoloj pri aliaj temoj koncerne la agadon de BEA, ekzemple pri la fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejoj dum 1921—1923 (ĝis la faŝisma puĉo) de Dimităr Papazov, pri la beletra E-literaturo de K. Karucin, pri la Bulgara E-teatro de K. Vălev, pri la virino en BEA de Belka Beleva, Esperanto kaj la profesioj de ing. Petăr Todorov, Esperanto kaj la junularo de A. Todorov kaj aliaj biografiaj skizoj. Interese rakontas J. L. Portnoj pri la internaciaj E-ligoj inter laboruloj en Kazahstana SSR kaj Bulgario. D-ro Detlev Blanke tuŝas la germanan-bulgaran amikecon pere de Esperanto.

La plejparto de la skizoj kaj artikoloj estas legitaj dum la scienc-praktika konferenco en Veliko Tărnovo 1982.

La enhavo de la libro „Esperanto en servo de la patrolando“ donas abundajn informojn al la legantoj kaj kompletigas „Skizoj pri la historio de Bulgara Esperanto-Movado“, en kiu estas interesaj materialoj („La E-movado ekde 1936 ĝis 1944“ de Keremidĉiev kaj „BEA post la popola venko super la faŝismo 1944—1960“ de Georgi Dolapĉiev), nur tiuj mankas en la bulgara eldono de la dua kolekto, kio ne devis okazi. Oni povis respeguli ankaŭ aliajn momentojn el la historio de BEA — pri la ligoj kaj internacia korespondado de la esperantistoj, pri la multnombra E-gazetaro, pri MEM kaj la aktiveco de la bulgaraj esperantistoj kontraŭ la atomarmado, por senarmigo, por paco kaj amikeco inter la popoloj. Oni povis represii ankaŭ la fotografaĵojn en la „Skizoj pri la historio de Bulgara Esperanto-Movado“, eĉ ankaŭ aldoni aliajn de elstaraj E-agantoj, de kongresoj, konferencoj k.a. Iuj aŭtoroj en „Esperanto en servo de la patrolando“ aperis 2—3—4-foje sur la paĝoj, iuj spertuloj mankas kiel la menciita supre V. Oljanov k.a.

La libro-kolekto „Esperanto en servo de la patrolando“, malgraŭ tio estas interesa, leginda kaj rekomendinda eĉ por la neesperantistaj legantoj. Ja ĝi respegulas la aktivecon de unu forta kultur-kleriga amasa taĉmento, kiu kontribuis al la liberigo de Bulgario el sub la faŝismo kaj kapitalismo, kiu ankaŭ nun estas en servo de sia patrolando — en la konstruado de evoluinta socialismo, ĝi popularigas niajn sukcesojn, kontraŭbatalas, senmaskigas la militemulojn, batalas por paco kaj sekureco en la mondo.

IV. ESPEROV

NOTO DE LA REDAKCIO

Por plivigli la aktivadon de la distrik-taj kaj societaj E-estrazoj kaj por instigi la geesperantistojn en nia lando al pli variaj kaj interesaj arangoj en ilia por- kaj peresperanta agado, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ decidis disponigi al la sekretario de BEA Dimităr Papazov korespondadojn kaj informojn, kiujn sendas niaj korespondantoj el la tuta lando, por ke li komentu ilin. Ni esperas, ke tiamaniere ni kontribuos por plivigli kaj plibonigi de nia enlanda movado.

Karaj geamikoj,

Mi plezure akceptis la proponon de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gvidi la rubrikon „Koncizaj komentoj“.

Dum la lastaj jaroj oni povas konstati certan plivigligon en la kompleta E-aktivado — organiza, instrua, propaganda, kultura, internacia ktp. En la E-societojn kaj organizaĵojn venis novaj junaj aktivuloj, kiuj transpreninte la impeton kaj entuziasmon de la pli aĝaj kaj pli spertaj esperantistoj, prenis de iliaj manoj la stafeton. Estis fonditaj novaj E-societoj, estis restarigitaj iuj el la malnovaj. Naskiĝis nova formo de esperantista aktivado — la kluboj „Esperanto“ en lernejoj, entreprenoj, sindikataj kaj junularaj domoj de kulturo, ĉe kluboj de internacia amikeco kaj aliloke. Videble plialtiĝis la nombro de E-arangoj en la lando — nun preskaŭ ĉiu societo kaj Distrikta Estraro havas la ambicion organizi sian propran arangon. Ĉe renkontiĝo kun multaj el vi en kunvenoj, plenkunidoj, konferencoj aŭ ĉe aliaj okazoj, ni interparolis pri diversaj flankoj de la aktivado de E-societoj kaj organizaĵoj, pri la formoj kaj la rimedoj, pere de kiuj ĝi povus priboniĝi. Urgante nin plenumi iun aŭ alian senprokrastan taskon, ofte ni ne sukcesis fini nian interparolon.

La ideo de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ disponigi al mi iujn el la de vi senditaj korespondadoj por konciza komento, permesos al ni daŭrigi nian interparolon, turni atenton al vico da iniciatoj de la E-societoj kaj organizaĵoj, elvoki ankaŭ ĉe la ceteraj deziron pri fruktodona laboro. Tio helpas ankaŭ la junajn aktivulojn pli rapide orientiĝi en la multflankaj formoj de laboro, konstati la pozitivajn momentojn en sia laboro kaj ankaŭ tion, kio ankoraŭ mankas al ili.

Ni esperu, ke la nova iniciato de „Bulgara Esperantisto“ estos rezultodona kaj helpos por plialtigi de la kvalito de nia laboro.

DIMITĂR PAPAZOV,
organiza sekretario de BEA

NIAJ JARKUNVENOJ

VELIKO TĂRNOVO

Poŝtista E-societo „Fluganta letero“ ĉe la distrikta poŝto en Veliko Tărnovo antaŭ ne-longe okazigis sian laŭvican jarkunvenon. En la priagada raporto Mladenka Rusinova, prezidantino de la societo, substrekis, ke ĉiuj taskoj de la pasinta periodo estis dediĉitaj al la Monda Komunika Jaro kaj PTT-progreso. Krom tio la membroj partoprenis en organizaĵoj, turistaj, sportaj kaj aliaj arangoj, okazigitaj de la Distrikta Estraro.

Dum 1983 estis varbitaj kvar novaj esperantistoj el inter PTT-medio kaj la nombro de societaj membroj altiĝis je 17. Ĉiuj abonis la E-periodaĵojn: „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Scienca Mondo“, „Kolektanto“ kaj „Interligilo“.

La kunveno akceptis rezolucion por la estonta laboro. Estis elektita nova estraro kun prezidanto Mladenka Rusinova.

GEORGI KIROV

ĈEPELARE

Riĉenhava kaj varia estis la laboro de E-societo „Diĉo Petrov“ — Ĉepelare, tamen en la jarraporto, tralegita de Dimităr Marev — prezidanto de la societo, kaj en la eldiroj estis certa malkontentiĝo. Oni montris neutiligitajn eblecojn, kiuj povas helpi, por ke la E-agado estiĝu pli ampleksa, kun pli granda edukifiko.

Dum la jaro oni organizis E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, en kiuj partoprenis triono de la esperantistoj. Estas plivastigita la internacia korespondado.

En la klerig-eduka laboro okazis vico de arangoj: prelegoj pri la signifo de Esperanto, radio-horoj, vesperoj kun E-muziko.

Riĉenhava estis la amatora artaktivado. Komsomolaj kaj junpioniraj grupoj pri artparolo kaj kanto partoprenis en distriktaj kaj naciaj revuoj kaj festivaloj. En Botev-recitalo Nikolina Takova kaj junpionira grupo ricevis laŭreatan titolon, kaj N. Daskalova kaj S. Dimitrova — specialan premion de DE de BEA — Vraca.

Esperanta kinoklubo „Eŭridika“ — Smoljan, kreis kolorfilmon „Sub la verda stelo“, kiu spegulas la pasinton kaj nuntempon de la E-movado en Ĉepelare. La societo sukcese disvolvas mastruman agadon. La 45 produktantoj atingis 71 000 levojn pli ol la plano.

La nova estraro, kies prezidanto estis reelektita Dimităr Marev, celas atingi novajn sukcesojn en la nobla E-movado.

MARIA DIĈEVA

DU SUKCESAJ JAROJ

Pasis du jaroj, depost kiam grupo de adeptoj de la Internacia Lingvo, helpe de la Sindikata Komitato, fondis Klubon de Esperantisto „Metalurgo“ ĉe la Domo de Kulturo de Alumina Kombinato — Sumen. Tiu periodo estis malfacila, sed la progresintaj kaj komencantaj esperantistoj iris ĉiam antaŭen kaj la unuaj rezultoj jam estas fakto.

En la printempo de 1982 oni ellaboris Regularon pri la Kluba Agado kaj estigis kluban konsilion. La instrulaboro kaj metodika estrado estis komisiita al la multjara kaj senlaca propagandanto kaj lektoro Ilija Andreev. La unua lernojaro finiĝis sukcese. Estis starigitaj ligoj kun kluboj kaj esperantistoj el fremdaj landoj, kiuj transformiĝu al daŭra amikeco por profesia spertintersaĝo. Sub la devizo „Ni havas amikojn tra tuta Sovetio“, helpe de la kombinata Konsilio pri Bulgara-Soveta Amikeco, estis organizita emocia renkontiĝo dediĉe al la 60-jariĝo de Sovet-Unio. Solene oni celebris la 60-jaran datrevenon de la glora Septembra Ribelo kaj partoprenis la Nacian Konferencon en Stara Zagora. Klubanoj ĉeestis ankaŭ seminarion pri scienc-teknika informado kaj utiligo de Esperanto, okazintan en Karlovo, kaj en la Tagoj de Esperanta Kulturo en Sofio.

La instruado en la dua lernojaro ampleksis jam du gradojn — komencanta kaj progresinta. Multaj klubanoj estas bonaj produktantoj kaj aktivaj sociagantoj.

Tiujn bonajn rezultojn raportis al la unua priagada kunveno inĝ. Ivan Kostadinov, ĝisnuna prezidanto de E-klubo „Metalurgo“.

Estis elektita nova estraro.

CVJATKO TODOROV

FESTA KUNVENO

En Pazarĝik okazis kunveno, dediĉita al la Internacia Virina Festo. Varman paroladon faris d-ro Ivan Ĉunĉev, prezidanto de Urba Estraro. Poste sekvis riĉa literatura-muzika programo. La atenton kaptis tre interesa kvizo pri temo: „El la historio de E-movado en Pazarĝik de 1910 ĝis nun“.

Nia elstara veterano-esperantisto Kosta Konstantinov ludis antikvan armenan muzikinstrumenton „Ut“ kaj kantis bulgarajn popolkantojn. Aparte impresis la plej novaj esperantistoj, kiuj variigis la amuzprogramon.

KONSTANTIN GENĈEV

Koncizaj komentoj

VELIKO TĀRNOVO

La Poŝtista E-societo en Veliko TĀrnovo estas unu el la stabilaj profesiaj societoj en la lando. Impresas la fakto, ke ĝia aktivado estis konformigita al la ĉefa temo de la pasinta jaro — la Monda Jaro de Komunikado, kiu unuigis la multflankan aktivadon tiudirekte de pluraj niaj kaj eksterlandaj E-organizaĵoj. La societo altigis la nombron de sia membraro per 25%. Ni deziras al la poŝtistoj-esperantistoj el Veliko TĀrnovo, ke ĉi-jare ilia membraro kresku ne per 25%, sed per 25 novaj membroj!

ĈEPELARE

Riĉenhava kaj varia aktivado dum la pasinta jaro — tiel koncize ni povus difini la laboron de unu el la plej agemaj E-societoj en la distrikto de Smoljan. Du gravaj momentoj en la vivo de la societo altiras la atenton: strebo al varia kultura laboro kaj ambicio por perfektigo en Esperanto flanke de multaj ĝiaj membroj — tasko, kiun ni ofte neglektas! Ni estas certaj, ke la nova estraro, gvidata de D. Marev, montros ankoraŭ pli viglan kaj diversflankan aktivadon.

ŜUMEN

La E-societoj en Sumen trovis la ĝustan formon de laboro — ili fondis Klubon de Esperantisto ĉe la Kulturdomo en la Alumina Uzino. Meritas atenton la aktivado de la Klubo por starigo de kontaktoj inter la esperantistoj el la uzino kaj tiuj el simila uzino aŭ entrepreno el Hungario Plej valora momento en la aktivado de la klubo estas la starigo de kontaktoj kun la ceteraj organizaĵoj en la uzino mem — la sindikata organizaĵo kaj la scienc-teknika societo, kiuj fakte estas la plej konvena kaj natura medio por aplikado kaj disvastigado de Esperanto kaj helpas la klubon morale kaj finance. La dujara agado de la klubo estis sukcesa kaj rezultodona. Ni bondeziras al la klubanoj novajn sukcesojn.

PAZARĜIK

Klasika formo de laboro, tute nepravigeble subtakdata dum la lastaj jaroj — la kvizo, ĉeestas en la tagordo de solenaĵo, dediĉita al la Tago de Virinoj — 8-a de marto. La bona impreso de sinprezentado de la novaj esperantistoj montras, ke oni devas pli ofte kaj pli kuraĝe apogi sin sur ilin en la kultura laboro — unuflanke, por variigi ĝin kaj aliflanke, por altiri ilin al aktiva partopreno en la societa laboro.

EN HAVO

R. BANČEVSKI. Komunaĵo de egalrajtaj partne- roj	II
T. JIVKOV. Plej grava tasko (el enkonduka paro- lado)	1, 2
D. ĤITROV. Esperanto-kantoj kaj parolo en Plov- div	3, 4, 5
* * * Listo de la premiitoj	6, 7
* * * Novaj libroj	7
ST. PETROVA. Rememoroj pri mia frato Diĉo	8, 9
AS. JOSIFOV. „La Rodopa Falko“ (recenzo)	9
A. D. ATANASOV (ADA). Propraj esprimvoj de Esperanto	10, 11
N. ALEKSIEV. „Anatol“ en Esperanto (recenzo)	11
IV. VAZOV. Emocioj de Rada (fragmentoj el la ro- mano „Sub la jugo“)	12, 13
* * * Poezio	13
IV. ESPEROV. „Skizoj pri la historio de bulgara E-movado“ kaj „Esperanto en servo de la patro- lando“ (recenzoj)	14
* * * Enlanda movado	15, 16
D. PAPAŖOV. Koncizaj komentoj	16
* * * Tra la gazetaro	III
* * * Deziras korespondi	III
* * * Senmorta Sekspiro	IV
W. Shakespeare. Hamleto, reĝido de Danujo (frag- mento)	IV

TRA LA GAZETARO

En Sofio:

Jurnalo „Oteĉestven Front“ (5 III. 84) en informo el Budapeŝto pri la okazinta en marto Kultura Festivalo en la ĉefurbo de Hungario mencias pri partopreno de Esperantaj teatroj. La sama ĵurnalo (12. III. 84) donas lokon al speciala korespondaĵo de Rumjana Bojanova, titolita „Sekspiro en Esperanto“ — pri Esperanto-Teatro en Leningrado, kiu surscenigas „Hamleto“-n. Aldone ŝi informas, ke la sama teatro prezentos fragmenton el la dramverko „Ruĝo kaj bruno“ de la bulgara verkisto Ivan Radoev. J. „Narodna Mladej“ (7. III. 84) aperigis longan intervjuon kun Marin Marinov, prezidanto de LKK de la 36-a IFEF-kongreso, okazinta en majo en Slanĉev Brjag. La instruista semajna ĵurnalo „Uĉitel'sko Delo“ (14. III. 84) anoncis pri naciskala porinstruista E-kurso en Sofio dum la printempaj lernejaraj ferioj.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Haim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta Komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVIANSKI,
Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar
ĤAĜIEV, Krástju KARUCIN
Administranto — Asen JOSIFOV

En la provinco:

Jurnalo „Sumenska Zarja“ — urbo Sumen (28. II. 84) publikigis la paroladon de Jordan Jotov, membro de Politburoo de CK de BKP antaŭ la distrikta partia konferenco, en kiu li tre favore pritaksis Esperanton. En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — urbo Vraca (28. II. 84) aperis letero de japana esperantisto al esperantisto el Vraca. J. „Septemvri“ — u. Bjala (22. III. 84) informas pri novefondita E-societo en v. Polsko Kosovo.



POLLANDO

Malgorzata Popialkiewicz (25-jara fraŭlino) — ul. Strzelecka 17 m 19 — pri poezio, popolaro, slojdo, ĝardenlaboro.

Eugeniusz Stepień (33-jara kuracisto) — os. 700-lecia 13/5, PL-32-650 Kety — kun ĉi pri kulturo, historio, geografio kaj vivmaniero; kol. mapojn, pagilojn, E-gazetojn, bk.

Zdzisław Wierzbicki (30.-j.) — Pabianicka 23/3, PL-53-339 Wrocław — kun ĉi pri literaturo, muziko, sporto, turismo, baletto, kino, teatro, naturo; interŝ. bk, gramofondiskojn.

SOVET-UNIO

Anoj de E-rondeto en mezlernejo n-ro 69 en Krasnodaro — ĝemela urbo de Burgas, deziras korespondi kun bulgaraj ĝelernantoj. Adreso: Esperanto-Rondeto, Internacia Amikeca Klubo, Mezlernejo n-ro 69, str. „Dimitar Blagoev“ 22, SU-350061 Krasnodar.

Rezonova Nina (23-jara teknikistino), SU-352130, Krasnodarskij kraj, u. Kropotkin, per. Kolhoznoj 14/48 — kun ĉi kol. librojn, aforisimojn.

Anatolio Dovbiŝ (40.-j.) — SU-245110 Ŝostka — 7, Sumsk, p. k. 27, Ukrainio — kun ĉi pri E-movado, interŝ. ĉiuspecajn E-ajojn, bk de katoj kaj hundoj, ekslibrisojn, poŝkalendaretojn. Validas ĉiam.

Friderik Batrak (36.-j.) — SU-245110 Ŝostka 7, ul. Privokzalnaja 13—10 — kun ĉi pri arto, muziko, literaturo; interŝ. fotojn de filmaktoroj, gramofondiskojn, razilklingajn etiketojn.

SVEDIO

Martin Villotsson (67.-j.) — Brogatan 15, S-669 00 Deje — kun bulgara esperantisto pri politiko, landoj kaj popoloj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Venas nova generacio de plenumantoj — Ralica Drumeva kaj Radoslav Danov, gajnintoj de II premio en XVII Nacia Revuo de Esperanto-Kantoj kaj Parolo en Plovdiv.

Foto: Ĥristo Meĉev.

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario
tel. 31-70-19

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata prezejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

SENMORTA ŜEKSPIRO



(23. 4. 1564—23. 4. 1616)

Ci-jare finiĝas 420 jaroj depost la naskiĝo de la granda angla poeto kaj dramverkisto William Shakespeare (Sekspiro).

Sekspiro estas unu el la mirakloj de la mondo, pri kiuj oni neniam ĉesas admiri. La historio antaŭeniras per grandegaj paŝoj, ŝanĝiĝas la aspekto de nia planedo, kaj tamen la homoj ĉiam ankoraŭ bezonas la kreaĵojn de tiu poeto, de kiu nin dividas kelkjarcenta distanco.

„La granda bazo de liaj verkoj estas la vero kaj la vivo mem“ — skribis Goethe.

Jam en la malproksimaj jaroj, kiam Esperanto faris siajn unuajn paŝojn, la verkaro de Sekspiro altiris la atenton de la unuaj E-poetoj.

En 1894 Zamenhof mem tradukis la tragedion „Hamleto, reĝido de Danujo“, kies oka eldono aperis en 1964.

En Esperanton estas tradukitaj „Tragedio de Otelo, la maŭro de Venecio“ (Tradukis Reto Rosetti, 1960); „Reĝo Lear“ (traduko de K. Kalocsay, 1966); „Somermeznokta sonĝo“ (traduko de K. Kalocsay, 1967); „Epifanio“ aŭ „Kiel vi volas“ (traduko de W. Auld, 1977).

Lastatempe en „Esperanto“ oni sciigis, ke W. Auld tradukis ankaŭ la Sonetojn de Sekspiro.

Do, kiel vidiĝas de la supraj linioj, la Seks-pir-verkaro estas sufiĉe amplekse kaj kompetente prezentita en E-tradukoj. Kaj certe la intereso al la genia poeto kaj dramisto ne ĉesos kaj ankaŭ la estontaj E-generacioj donos sian kontribuon en tiu ĉi kampo.

Ci-sube ni proponas al la atento de niaj legantoj fragmenton el la belega Zamenhofs traduko de „Hamleto“.

HAMLETO, REGIDO DE DANUJO

Elsinoro. Cambro en la palaco. La reĝino kaj Horacio.

REGINO

Ne, ne! Ne volas mi kun ŝi paroli.

HORACIO

Si forte petas, ŝia stato estas
Tre kompatinda.

REGINO

Enlasu ŝin! (Horacio foriras). Al la anim'
malsana

Aperas ĉie signoj de danĝero;
La kulpo estas tiel timoplena,
Ke per kaŝado ĝi sin nur malkaŝas!

(Venas Horacio kun Ofelio.)

OFELIO

Kie estas la bela reĝino de Danujo?

REGINO

Kiel vi fartas, Ofelio?

OFELIO (kantas)

Mia kara, mia belo
Estis brava juna dano;
Portis plumojn sur ĉapelo
Kaj bastonon en la mano.

REGINO

Ha, mia kara fraŭlino, kion signifas tiu ĉi
kanto?

OFELIO

Kion? Mi petas vin, aŭdu:

(Kantas)

Vane estas la espero:
Li jam mortis, ne revenas!
Lian kapon kovras tero,
La piedojn ŝtono tenas.

REGINO

Sed diru al mi, Ofelio. . .

OFELIO

Mi petas vin, aŭskultu.

(Kantas)

Ĉemizeton oni metis. . . (Eniras la reĝo)

REGINO

Ha, mia edzo, rigardu!

OFELIO (kantas)

Sur karulon inter ploroj;
Sur la tombon oni jetis
Multon el la kampaj floroj.

REGO

Kiel vi fartas, kara fraŭlino?

OFELIO

Mi dankas! Tre bone. Oni diras, ke la strigo
estis filino de bakisto. Ha, sinjoro, ni scias,
kio ni estas, sed ni ne scias, kio ni povas fa-
riĝi. Bonan apetiton!

REGO

Si ne povas forgesi la patron.

(Fragmentoj el akto IV, sceno V
de la Zamenhofs traduko)

